

NOVAĴLETERO

Nr. 19
Mei 1985

Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista
Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperantö-Groep

Ver. Uitg.: R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-3000 Brugge

Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85
van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge.
Steunende leden: 500 fr.

Serĉpromenado

Op zaterdag 18 mei a.s. organiseert de Gentse groep "La Progreso" zijn jaarlijkse wandelzoektocht. Alle Esperantisten zijn welkom tussen 14.30 en 15.00 u. in café-restaurant Veneziana (Gravenkasteel).

De zoektocht zal de deelnemers langs de meest aantrekkelijke hoekjes van Gent brengen. Achteraf is er gezellig samenzijn en mogelijkheid voor avondeten.

De verplaatsing vanuit Brugge zal wellicht vlotst per trein gebeuren. Eventuele afspraken voor transport op telefoonnummer 33.00.04.

Markola Kongreso

Wij zijn zo vrij het uitstekende verslag over te nemen dat een congresdeelnemer samengesteld heeft voor een Frans dagblad. Zie pagina 4.

Esperantostraten

Over gans de wereld zijn er, voor zover bekend, meer dan 450 straten die genoemd zijn naar Esperanto, of naar zijn ontwerper, Dr. Zamenhof. In België is dit o.m. het geval te Antwerpen, Anderlecht, Boom en Schoten. Ook Brugge is goed bedeed, met een Esperantostraat (Assebroek), een Dr. Zamenhoflaan (Sint-Kruis) en een A.J. Witteryckstraat (stichter van de Brugse Esperanto-Groep; Assebroek).

Een statistiek hiervan wordt bijgehouden door Hugo Röllinger (Theresienstr. 23, D-8730 Bad Kissingen). Zou iemand voor hem kunnen achterhalen in welk jaar de Assebroekse Esperantostraat die naam gekregen heeft? Zijn er nog andere Esperantostraten in Vlaanderen?

Kamperen

Als 1.000 Esperanto-sprekers kamperen in de ongeveer 1.000 kampeerterreinen die Frankrijk rijk is, dan is de kans dat 2 of meer Esperantisten elkaar ontmoeten natuurlijk zeer gering. Als diezelfde 1.000 personen echter naar een veertigtal uitgezochte kampeerterreinen op vakantie zouden gaan, zijn de kansen op een ontmoeting meteen veel hoger. Wie interesse heeft voor deze vorm van kampeertoerisme, kan contact opnemen met: Pieter J. van Duijne Sr., Sint-Pieterstraat 9, Postbus 265, NL-4331 AG Middelburg.

AR

FLEJA-Kunveno

La oka FLEJA-kunveno okazos en Merkenveld (Loppem-Zedelgem) de la 8a ĝis la 10a de marto 1985a. Temo de la kunveno estos "Junularo kaj Arto". Aliĝiloj estos baldaŭ haveblaj.

AR

Aliĝintoj al Markola Kongreso - Fina Listo

81. Klaŭdo Hastir	87. Gilberte Maertens
82. Oene Hoekstra	88. Gaston Rabosée
83. Antje Steffen	89. Leo Debruyne
84. Lucien Bourgeois	90. Marie-Louise Roose
85. Louis Bourdon	91. Josée Blockmans
86. Georgette Preux	92. L. Bernaerts-Toussaint

Venontjara Markola Kongreso

okazos en Folkestone de la 20a ĝis la 22a de aprilo 1986. Detalaj informoj estos baldaŭ haveblaj.

Ora Libro

En la Ora Libro de la grupo, pluraj kongresanoj skribis siajn rimarkojn. Plej trafa kaj mallonga: "Mi estas feliĉa ĉi tie."

Chronique espérantiste :

LE 19^{me} CONGRÈS DU DETROIT

A Bruges, du 19 au 21 avril, s'est déroulé le 19^{ème} Congrès Espérantiste du Detroit où se sont trouvés côte à côte Belges, Britanniques, Hollandais, Allemands et Français, tous partisans et partiquants de la géniale langue du docteur L.L. Zamenhof.

Dans l'après-midi du vendredi 19 s'est organisé un service de transport des congressistes venus par le train, depuis la gare (où nous attendait une Brugeoise tenant ostensiblement le fanion à l'étoile verte) jusqu'au lieu d'accueil du congrès (la brasserie Henri Maes).

Le soir, tous s'attablèrent autour d'un repas campagnard après lequel, M. Grégoire Maertens, brugeois et président de l'U.E.A. (Association Espérantiste Universelle) prit la parole pour donner des nouvelles du Congrès Universel de 1965 qui se tiendra à Augsburg (R.F.A) et pour souligner l'importance de petits congrès comme celui-ci.

La prestation d'une chanteuse termina la soirée.

Le samedi, il y eut d'abord une excursion en autobus. Guidés avec compétence par une autre espérantiste brugeoise, nous avons admiré les monuments et les édifices de cette ville riche d'histoire, entre autres : l'Église Notre-Dame, la cathédrale St-Sauveur, le « Markt » avec son beffroi du XIII^è siècle, le « Burg » avec l'hôtel de ville, les canaux et les moulins.

Le car nous conduisit ensuite à Damme qui fut l'avant-port de

Bruges. Enfin, l'on se dirigea vers Knokke-Heist, puis Zeebrugge où l'on put regarder les installations du port.

L'après-midi fut consacré à la visite du musée Guido Gezelle, poète religieux (1830-1899) d'expression néerlandaise.

Nous avons vu la traduction d'un de ses poèmes en Espéranto.

Un excellent repas du soir nous fut servi dans une des dépendances de la brasserie. Nous n'avons pas pris part à la visite des monuments illuminés. Motif : temps trop frais !

Le dimanche, d'autres musées furent encore visités. D'abord Groeninge-museum avec les tableaux de Van Eyck, David, Bruegel le Jeune etc, puis Memling-museum situé dans l'hôpital Saint-Jean (XII^è - XIII^è siècles). Le congrès se termina à ce moment et les au-revoir commençaient, mais les dévoués espérantistes locaux étaient encore à notre disposition, si nous ne partions pas tout de suite, pour nous conseiller d'autres visites. C'est ainsi qu'après avoir contemplé la « Vierge à l'enfant » de Michel-Ange à l'église Notre-Dame, nous avons passé le restant de la journée au Gruuthuse-museum où quantité d'œuvres d'art et de choses diverses sont exposées.

Rendez-vous est déjà pris pour avril 1966 à Folkestone. Comme est réconfortante l'amitié qui lie les espérantistes du Detroit !

J. DUCROUX

19a MARKOLA KONGRESO

BRUGGE, BELGIO, 19-21 APR. 1985

Kor.adr.: R. Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge. Tel. 050/330004

Mi ekverkas ĉi-tiujn pripensadojn dum la semajnfino post la Markola Kongreso. Estas vento, malvarmo, pluvo, hajlo...: vere vintra vetero. Ni almenaŭ ne rajtas plendi pri la vetero dum la kongreso.

La plej gravaj fakturoj ankoraŭ ne alvenis. Tamen, laŭ miaj taksoj, estos malgranda profito. Dum la pasintaj tagoj venis la unuaj skribaĵoj reagoj de la kongresanoj. Mi petas la korespondantojn konsideri tion kiel respondojn. Mi sendas ĉi-tiun komunikon ankaŭ al pluraj aliaj grupoj en Belgio. Eble, okaze de iu kunveno, la kongresorganizantoj (-intoj, -ontoj) havos eblecon por interŝanĝi spertojn.

La Kongreso

Ĉu Markola Kongreso estas kongreso? Mi mem nur partoprenis la pasintjaran en Boulogne. El la malmultaj historiaj informoj kiujn mi travis, mi konkludas ke ĝi evoluis de kongreso kies partoprenantoj subtenis certajn vivkonceptojn, al simpla amika kunestado.

Je la fino de 1963 oni petis min organizi Markolan Kongreson en Brugge. Kion, kiel...: tute ne gravis. Estis nur unu petego: estu nur Markola Kongreso, kaj neniu alia samtempa Esperantista aranĝo, kiel kelkfoje okazis en pasinteco.

Dum la preparoj daŭre validis jenaj konsideroj:

- Markola Kongreso en Brugge estu precipe turisma aranĝo.
- Ĉar la homfortoj de Bruĝa Grupo Esperantista estas limigitaj, la ĉiuspecaj (precipe administraj) taskoj estu laŭeble farataj antaŭ la kongreso.

La Dato

Aprilo ja estas frua dato por turisma semajnfino; la vetero tute ne estas fidinda. Aliflanke, ekde majo la turistoj venas amas. Tio estas neagrable se oni vizitas la vidindaĵojn kaj ekde tiu periodo ankaŭ eblas problemoj pri loĝado.

Dum majo ankaŭ okazas kermeso (Meifoor). La loko de tiu kermeso restis necerta ĝis la lasta momento; la ĉirkaŭaĵo de Katelijnepoort estis ebleco. Vi sciu ke kermeso povas esti bruiga, precipe vespere... Meifoor finfine nun okazas je Zand kaj ĝiaj trafikiloj troviĝas ĉe Katelijnepoort; la hotelo Barge pro tio iĝis malbone atingebla.

La Kotizo

Mi kalkulis bazen kotizon de 1.000 fr., uzota tiel:

- 250 fr. por administrado;
- 250 fr. por aŭtobusa ekskurso;
- 250 fr. por iu Esperanta kultura aranĝo (teatro);
- 250 fr. por muzeovizito.

Necesus longaj kalkuloj por ekscii ĉu tiuj ciferoj efektiviĝis.

Rilate al administrado, estis multe da sendkostoj, ne nur al la kongresanoj, sed ankaŭ al diversaj instancoj, al informpetantoj...

Por la ekskurso estis inter 70 kaj 80 mendoj. Malfacila decido: ĉu rifuzi parton de la ekskursontoj, ĉu mendi duan aŭtobuson, kiu estos nur duonplena? Ni mendis plian, kaj tiel donis al parto de la kongresanoj eblecon por viziti kvartalon kiu kutime restas neatingebla por turistoj.

Malgraŭ esperdonaj kontaktoj, ni ne sukcesis kontrakti E-teatron. Anstataŭ tio, la kongresanoj ricevis simplan vespermanĝon je alveno, kun mallonga prezentado de Nicole Peircux.

La preparo de la muzeovizitoj estis vere problemiga. Mi volis eviti ke dekoj devos individue aĉeti enirbileton. Mi serĉis solvon kompareblan al ĝenerala bileto per kiu oni povas senlime uzi la publikan transporton en urbejoj. Mi trovis solvon laŭ kromvojo: komuna membreco de "Vrienden van de Stedelijke Muzea". Post vizito de 3 aŭ 4 muzeoj, la membrec-pago estus "regajmata". Tamen, la urbestro antaŭ nelonge decidis ke ankaŭ la membroj de tiu asocio devas krompagi etan sumon. Por la simpleco... Plie, mi tro malfacile konstatis ke mi malbone nitis la membrokarton al la kuponfolioj, tiel ke multaj kongresanoj eĉ ne rimarkis ke ili havas tian karton.

Por instigi al frua aliĝo, mi fiksis malpli altan kotizon por fruuloj, kaj pli altan por malfruuloj. Eble la diferenco inter tiuj tri kotizoj estis tro grande, tiel ke la lastaj aliĝintoj devis multon pagi por malmulton ricevi.

Por faciligi aliĝojn el eksterlando, mi fiksis kotizon en franca kaj brita valutoj, laŭ kurzoj kiuj antaŭ unu jaro estis realismaj. Bedaŭrinde, brita pundo nun tute ne plu valoras 80 fr.

Ni ne tro rapide diru ke kongreskotizo estas alta. Post la kongreso la LKK ja kelkfoje konstatas ke iuj eroj el financa vidpunkto estis eraraj. Ni memoru ke la LKK-anoj laboras senpage, ke ili plejofte estas nespertuloj kaj ke ili havas la tutan riskon en kazo de malsukceso. Ĉu ne pli bone havi profiton ol malprofiton?

Fonduso estos kreata, kiu ricevos parton de la profito de la ĉi-jara Markola Kongreso kaj se necese povos kovri venontajn malprofitojn.

La Kongresejo

Grava konsilo al kongresorganizantoj: ne hezitu, se necese, elspezi sufiĉe grandan sumon por disponi pri taŭga kongresejo. Ni serĉis malmultekostan (= senpagar) ejon en la hotelo kie loĝos la kongresanoj. Ĝi ja ne estis tre taŭga, sed konsiderante ke Esperantistoj estas ŝparemaj k.t.p. ...

Finfine, kelkajn monatojn antaŭ la kongreso, ni tamen serĉis pli bonan ejon. La salonoj de la bierfarejo Henri Maes ankoraŭ ne estis tute aranĝitaj, sed la estro promesis ke ĉio estos preta. Bedaŭrinde, li ne antaŭvidis la vintrajn monatojn kiuj venos. Cetere, la granda salono kie ni vespermanĝis je vendredo estu konsiderata kiel finpreta. Sajnas ke la gastoj ŝatas esti en tia halo. Ĉu la Markolanoj same opinias?

Kompreneble, se LKK trovas hotelon kiu samtempe estas bone uzebla kiel kongresejo, tio estas ideale solvo. Mia sperto tamen estas ke kombinado alportas riskojn.

Loĝado

Miaj spertoj post 15 monatoj da kontaktoj kun la loka hotelaro ne estas tre bonaj. Ĝenerale, la prezoj estas relative altaj kompare al la komforto. Mezgrandaj hoteloj modernaj estas malmultaj; De Barge estas favora escepto, sed havas nekutiman situon. Unupersonaj ĉambroj preskaŭ ne plu ekzistas.

La serĉado de taŭga hotelo (relative granda, uzebla kiel kongresejo, ĉambroj en pluraj prezklasoj) estis peniga. Unua ne plu estis libera dum kongresperiodo kaj cetere tro multekosta. Dua, rezervita tra turisma servo, post kelkaj tagoj anoncis ke oficisto eraris kaj ke ĝi ankaŭ ne plu estis libera (marto 1984!) Tria (Saint-Christophe) aspektis taŭga, kvankam la estro ne emis zorgi pri moderprezaj manĝeblaco (sed estis sufiĉe da aliaj restoracioj proksimaj).

Tamen, mi mistaksis la komfort-deziro de la markolanoj. Anstataŭ kelkaj, plejparto petis ĉambron kun banĉambro. Pro tio, mi devis serĉi plian hotelon: De Barge. Kelkajn monatojn antaŭ la kongreso, la estro de Saint-Christophe petis la nombron de loĝantoj. Estis nur malmultaj: liaj plej luksaj ĉambroj kaj kelkaj aliaj. Pro tio li "sugestis" ke ni tute malaperu, ĉar li havis pli interesajn gastojn. Finfine, ni loĝigis parton de la kongresanoj en Rembrandt-Rubens.

Se mi iam denove organizos kongreson, mi intencas konfirmi la loĝadon nur mallonga tempo antaŭ la kongreso. Tiel oni evitas daŭraj ŝanĝoj kaj estas pli facile elekti hotelo(j)n. Mia plej feliĉa momento dum la kongreso estis je vendredo, kiam mi estis informita ke ĉiuj havas loĝadon.

Organizo

LKK bezonas du estrojn: "ceremoniestro" kiu akceptas, prezentas kaj paroladas, duan personon kiu atentis pri la praktikaj problemoj de la kongresanoj. La pasintjara FEL-kongreso en Aalst estis bona ekzemplo. Bedaŭrinde, en Druĝa Grupo Esperantista mankas persono por la unua tasko.

Manĝado

Unue ni antaŭvidis nur vespermanĝojn en la kongresejo. Ĉar la kuiristino pretis fari tion kaj ĉar estis sufiĉe da petoj, ankaŭ venis tagmanĝoj. Tio estis ŝatata ebleco, sed aliflanke nia malmulta disponebla spaco estis ankoraŭ pli limigita.

Oficialaĵoj

Ege simpla resumo de la interparoladoj inter LKK kaj urbestro: ni povis elekti inter akcepto en urbdomo je vendredo kaj lumigado de la monumentoj je sabato. Mi opinias ke ni bone elektis.

Ne estis prezento de la landaj reprezentantoj je la komenciĝo de la kongreso. Eble tio estas manko. Mi ne scias kiel oni kutime aranĝas tion en Markola Kongreso.

Ankaŭ mankis oficiala adiaŭo. Venontfoje mi devos eviti tion. La demando estas: kiam kaj kiamaniere organizi tion? Parto jam foriras je tagmezo, parto restas ĝis lundo. Ĉu ni kunvenigu la kongresanojn por kelkaj paroladetoj? Ĉi-rilate denove mankas spertoj al mi.

Aliĝintoj - daŭrigo de la listo

- | | |
|--------------------------|--------------------------------|
| 81. Klaŭdo Hastir (B) | 87. Gilberte Maertens (B) |
| 82. Oene Hoekstra (NL) | 88. Gaston Rabosée (F) |
| 83. Antje Steffen (NL) | 89. Leo Debryne (B) |
| 84. Lucien Bourgeois (F) | 90. Marie-Louise Roose (B) |
| 85. Louis Bourdon (F) | 91. Josée Blockmans (B) |
| 86. Georgette Preux (F) | 92. L. Pernaerts-Toussaint (B) |

Gazetara Servo

La gazetaro (loka, kaj nacia reprezentata surloke) ricevis informojn antaŭ kaj post la kongreso, kaj estis invitata viziti la kongreson. Rezulto estis 4 artikoloj grandparte bazitaj sur tekstoj de la LKK (Brugsch Handelsblad, 2 + foto; Vlaams Weekblad; Het Volk. Estis pluraj mencioj en kulturaj kalendaroj. Mi aŭdis pri kelkaj aliaj artikoloj, sed - ĝis nun - ne ricevis detalojn. Kongresano J. Ducrocq prizorgis artikolon en "Nord-Littoral" (Calais) je 85.04.28.